August Graf von Platen-Hallermünde,

# La tombo en la Busento

*tradukita de H. Gerke*

Nokto estas. Ĉe Kosenco,
kie la Busento ondas,
murmuretas surdaj kantoj,
de la akvo bru' respondas.

Sur la bordo tien-reen
movetiĝas kvazaŭ homoj:
mortis reĝo Alariko,
ploras gotaj la fantomoj.

Malproksime de la hejmo
la aspiroj neniiĝis,
malgraŭ ke sur liaj ŝultroj
bukloj de l' junec' ondiĝis.

Jen — fluejon novan fosis
la herooj tre profundan,
kun fervoro devojigis
la riveron, la abundan.

Sur malplena fundo ili
laboradis — jen kavaĵo!
entombigis la mortinton
sur ĉevalo kun armaĵo.

La trezoron sian karan
ili kaŝis en la tero,
ke elkresku el la tombo
kreskaĵaro de l' rivero.

Rekondukis la riveron
per fervora laborado;
ree la antaŭan vojon
ŝaŭmis ĝi kun ondegado.

“Dormu en honor', heroo!”
kantis la funebra ĥoro,
“la avidon kontraŭstaru
via tombo, via gloro!”

. . .

Kaj la himno sonegadis
tra la gota heroaro,
rulu ĝin, Busento-ondo,
rulu ĝin de mar' al maro.

*Traduko de la Germana poemo "Das Grab im Busento" de* August Graf von Platen-Hallermünde *(∗1796 – †1835) en Esperanton de H. Gerke.*

*Arg-840-1689 (2014-02-12 15:59:46)*

*Tiu ĉi traduko aperis en 1950 en „La Praktiko", Den Haag, Nederlando, n-ro. 9-12 (155-158), septembro-decembro 1950, (14-a jaro). Vidu ankaŭ: http://www.literaturo.dk/busento.htm. Pri la rivero Busento vidu: http://de.wikisource.org/wiki/Das_Grab_im_Busento. Pri la tradukinto nenio estas trovebla en la interreto. Vidu ankaŭ: http://www.mein-italien.info/it/letteratura/tomba-busento.htm. Pri la gazeto "La Praktiko" vidu: http://books.google.de/books/about/a_Praktiko.html?id=iG7lAAAAMAAJ&redir_esc=y.*